# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 25. Aprilo 30 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

## EKO atingas jam 25!



Jam aperis 25 komunikoj ĉi-jare. EKO gravas kaj servas! Jen nigro-punkta resumo pri la jaroj 2013 (la eko de EKO) kaj nun.

**2013: ●**

**2014: ●●●●●**

**2015: ●●●●●**

**2016: ●●●●**

**2017: ●●●●**

**2018: ●●●**

**2019: ●●**

**2020: ●●●●** (subita rekresko pro la pandemio)

**2021: ●●●●●**

**2022: ●●●●●●●**

**2023: ●●●●** (ĝis la 28a de aprilo)

La punktoj indikas la nombron de komunikoj, laŭ proporcia vidigo.

## Elstaraj komunikoj el la EKO-komunikoj

EKO 2013: 8. Post la kongresoj kun nova estraro de UEA.  Rejkjavik (IS)
EKO 2014: 53  (20 14 17). Kongresoj en Montevideo (UY) kaj Bonaero (AR)
EKO 2015 (25 13 14): 52. Kongresoj en Ostende (BE) kaj Lillo (FR)
EKO 2016 (20 3 16): 39 Kongresoj en Nitra (SK)  kaj Niregyhaza (HU)
EKO 2017 (16, 5, 15): 36 Kongresoj en Busan kaj Seulo(KR)
EKO 2018: (20  0 5):  25 Kongresoj en Madrido (ES) kaj Lisbono (PT)
EKO 2019: (10, 0, 7): 17 Kongresoj en Ĉaĉak (RS) kaj Jahti (FI).
EKO 2020: (39, 0, 21): 60. Kongresoj virtualaj.
EKO 2021: 50 ĝis nun (nov 15). Nova estraro de ILEI.
EKO 2022: (72) Kvarcent EKO-komunikoj tra la jaroj
EKO 2023: (25 ĝis la fino de aprilo)

## LAPA progresetas

La projekto <Landa Parad', LAPA> iom progresas. Ĝia celo estas konigi la staton de la Eo-movado tra la mondo. Por progresi, ni devas scii tion, kion ni nun havas. SMG, kiel la motoro de <LAPA> kredas firme je la graveco de aktuala informado.  Jen la nuna stato de LAPA, akirita per pena kontaktado kun ĉiuj Landaj Asocioj:

**Afriko:** Neniuj informoj venis ĝis apr. 25.. Repetita apr 12,
**Ameriko:** Unu respondo venis, el Kubo
**Azio:** Respondis Barato, Israelo, Japanio, Koreio, Mongolio kaj Nepalo.
Ne respondis ĝis apr 25: Ĉinio, Ĉinio-Tajvano, Filipinoj, Indonezio, Irano, Kamboĝo (sen movado), Kazaĥio, Laoso (sen movado), Pakistano, Singapuro, Srilanko (sen movado), Tajlando,  Taĝikio, Uzbekio,  Vjetnamio.
**Eŭropo:** Respondis: Albanio, Finnlando, Francio, Nederlando kaj Rumanio.
Ne respondis ĝis apr 25: Multaj! Listo estas.
**MONA:** Venis respondo el Irano.
**Pacifiko:** Respondoj venis el Nov-Zelando kaj Kanado.
Ne respondis: Aŭstralio, Meksiko kaj Usono

SMG rekontaktas la nereagintajn regionojn, post apr 11. La plano estas publikigi 'LAPA' en majo 2023.

## Brazilo brazilumas






Kaj vidu la novajn kantojn publikigitajn ĉi-semajne en **Brazila Kolekto**:

Pro la Pasko, jen du religiaj kantoj: *Kiam mi pensas pri Jesuo*, registrita de la minasa kantistino **Cacau**, kaj *Ŝaltu vian lumon*, tiu ĉi akompanata de bela video.
Kaj du komponaĵoj originale verkitaj en Esperanto: *Interkonsoliĝo*, de la elstara **Geraldo Mattos**, kaj *Kara frato*, de **Vera Jordan**.

Vi jam scias: musklaku sur la ĉi-subaj bildoj aŭ sur la butonoj “Aliru ĝin” por viziti la paĝojn de la kantoj, legi la muziktekstojn, spekti la videon ktp.

## Norvegio zomas kursojn

Marianne Lund uzos Zoom por disvastigi kursojn. Paralele, NEL debatas ĉu reteni aŭ luigi aŭ vendi sian grandan sidejon.

Norvega esperantisto 1/2-023

## Nova kurso en la movad-historie riĉa Maribor

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Reta
Gvidantonomo: Peter Grbec
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Maribor, Slovenio
Aldoninto: peterg

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27528

## Mondvojaĝoj de la koreo So Gil Su

La siatempa estrarano de UEA, kies filo same plenumas tiun rolon. So laste aperigis libron pri siaj vojaĝoj, ni alkroĉas la dokumenton.

Alk.Lia libro PDF

## Cent semoj perdiĝas, sed…

“Ni semas” estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. En 2022 ĝia regularo estis reviziita kaj nun la programo funkcias sub kunordigo de la Afrika Komisiono de UEA (AK) kun fokuso al Esperanto-projektoj en Afriko. Kadre de la programo la AK de UEA anoncas konkurson pri subvenciotaj projektoj en la kontinento. Interesatoj en partopreno devas koni la regularon kaj preferinde uzi la konkursan petilon, elŝuteblan en PD-formato aŭ rekte plenigeblan komputile: (mallonge.net/Ni-Semas-Reta-Petilo).

La subvencipetoj povas temi pri: Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj; trejnseminarioj por instruistoj; ekzamenpreparoj kaj ekzamenoj; aperigado de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj adaptitaj al afrikaj bezonoj (afriklingvaj kaj afrikec-enhavaj); kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj per Esperanto; financado por sendo de skrib- kaj lern-materialoj por lernantoj; informa agado en superaj lernomedioj ktp.

La proponoj konsistu el priskribo de la projekto (ne pli longa ol unu paĝo) kaj financa plano de la projekto sur alia paĝo. La financa plano klare indiku la bezonatan sumon: la programo subvencias ĝis maksimume € 100; se la bezonata sumo superas tion, la projektoportanto devas klarigi la fontojn de la alia parto. Oni prefere uzu la petilon

por sendi la petojn. Ĉiuj koncernaj dokumentoj kaj dosieroj rilate la petojn devas esti senditaj al la retadreso nisemas@co.uea.org, kies ricevantoj estas membroj de la Afrika Komisiono. La Afrika Komisiono ricevos petojn progresive kaj la lastan sabaton de ĉiu monato respondos al petantoj.

La kriterioj por aljuĝo de la plena subvencio baziĝos sur la realismo de la projekto kaj de la petata financa subteno. Oni rajtas peti subtenon por pli ol unu projekto dum unu jaro. La kapablo de la petantoj mem financi parton de la kostoj aŭ trovi aliajn fontojn aldone al la petata subvencio ne estas nepra kondiĉo, sed faktoro.

Esperantistoj dezirantaj subteni la programon kaj la Esperanto-agadon en Afriko povas fari liberajn donacojn al la Fondaĵo Afriko de UEA:

uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

Laŭ gazetara komuniko de UEA.

## Lernu la evean lingvon – alvoko el Afriko

Ĉu eblas lerni Esperanton per la evea (evegbe), unu el la naciaj lingvoj parolataj en Benino, Ganao kaj Togolando? Al la demando respondas nun Agado por la Progresigo de Esperanto (APETO) per filmeto: https://www.youtube.com/watch?v=qqMD2Sqjfiw. Bonvolu multege spekti kaj lasi viajn komentojn por kuraĝigi nin krei novajn filmetojn

Tiu ĉi unua leciono, prezento de la literoj de la esperanta alfabeto laŭ la eveaj sonoj, estas dokumentita per bildoj. Temas pri ekzerco farita de novaj esperantistoj por komencantoj dum la ĵus pasintaj kunvenoj de APETO. Ĝi celas ankaŭ montri la kulturon kaj lingvon de eveoj. Eblas per la filmo ankaŭ lerni la Esperanto-alfabeton el la evea lingvo: https://www.youtube.com/watch?v=qqMD2Sqjfiw&authuser=0

.Adjévi Adjé

## Medicinistoj elpaŝas, kune kun TEJO

UMEA per ĉi tio anoncas siajn novajn planojn




========= vortoj:  780 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php  por 2023 (ĝis 20.).

Aliaj Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kunj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.